

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

**Venerdì 9 gennaio**

**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

**Venerdì 16 gennaio**

Ritorna il piacevole incontro alla solita vicina pizzeria (prenotarsi in sede o presso Rodari, telef. 02 23 64 190) per poi proseguire in sede con un programma dal tema inedito:

**GLI AFORISMI DI PAPÀ**

a cura della prof.-ssa *Serenella Giacchino*, che nella duplice versione (italiano ed esperanto) ci presenterà parecchie concise massime, un distillato di spiritose e sagge definizioni dei più disparati aspetti della vita quotidiana.

**Venerdì 23 gennaio**

**RASSEGNA DELLA STAMPA ESPERANTISTA**

**Venerdì 30 gennaio**

ritorna l'utile rubrica

**RIĈIGU VIAN VORTARON**

Questa volta il tema della ricerca sono i fiori: non solo i loro nomi ma anche qualche comune termine sulla loro conformazione e coltura.

**Venerdì 6 febbraio**

oni ludas per

**KRUCVORTOJ**

**Venerdì 13 febbraio**

Si ritorna in pizzeria, con le citate modalità, e poi in sede ci attende una interessante conferenza del dott. *Aldo Taccani* sul tema:

**LA PARABOLOJ DE BUDHA**

Kelkaj moralaj aŭ amuzaj fabletoj de la fondinto de budhismo

**Venerdì 20 febbraio**

jen denove

### **LA TRADUKA RONDO**

**Venerdì 27 febbraio**

### **KONVERSACIA RONDO**

**Venerdì 5 marzo**

è aperta a tutti la

### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

## **BUON ANNO!**

Questo è il sincero augurio, anche se un po' in ritardo, che il C.E.M. fa ai suoi associati ed agli amici tutti. Che il nuovo anno porti loro gioia e soddisfazioni. Per il nostro Circolo l'anno appena conclusosi è stato nel complesso positivo: una bella e nuova sede, una discreta attività, un riuscito Convegno Interregionale, un miglior risultato con i corsi. La generosità dei soci e gli aiuti esterni, ed in parte qualche altra iniziativa favorita dalla nuova sede, hanno contribuito a far quadrare un bilancio che prevedeva serie preoccupazioni, che tali restano per il futuro. Auguriamoci di poter fare constatazioni dello stesso tenore anche nei prossimi anni. Ovviamente il supporto più importante resta quello dei Soci: il loro aiuto e la loro collaborazione, che possono concretizzarsi anche in modo diverso, sono vitali per l'associazione. Siamo certi che non ci verranno a mancare.

## **CENA DELL'AMICIZIA**

Anche quest'anno in occasione del carnevale ci sarà la tradizionale cena annuale, un momento di incontro per tutti gli amici e di allegria. Il programma definitivo è ancora da fissare, ma quasi certamente essa avverrà giovedì 26 febbraio. Pertanto tutti gli amici sono pregati di mettere in memoria questa data e tenersi disponibili.

## QUOTE DI ISCRIZIONE AL CIRCOLO ESPERANTISTA

Come è noto, in occasione dell'ultima assemblea i soci hanno deliberato un piccolo ritocco delle stesse e pertanto ecco la tabella aggiornata, con le diverse possibilità di scelta e sempre comprensive dell'iscrizione al Circolo e alla FEI. Le quote solo locali del CEM, poste tra parentesi, sono riservate esclusivamente a qualche s-ano già socio della FEI presso altro gruppo che desidera iscriversi anche da noi.

Socio ordinario	(24,50)	45,00
Socio giovane	(12,50)	22,50
Socio familiare	(12,25)	22,50
Socio sostenitore FEI e CEM	(73,50)	135,00
Socio garante FEI e CEM	(245,00)	450,00
Socio ord. FEI e sost. CEM		94,00
Socio sost. FEI e ord. CEM		101,00

Sono *Soci giovani* con quota ridotta *i nati dal 1° gennaio 1980*. Il *Socio familiare* è allo stesso indirizzo del socio titolare.

Per i nuovi Soci e per i cambi d'indirizzo dalla FEI è previsto un contributo di un euro per spese di segreteria.

Il CEM e la FEI, sempre in difficoltà economiche, sperano nel generoso aiuto di tutti.

## QUOTE U.E.A. PER L'ANNO 2004

<b>MA-(T)</b>	Membro individuale con rivista e Jarlibro	€ 54,00
<b>MJ-(T)</b>	Membro individuale con solo Jarlibro	€ 22,00
<b>MG -</b>	Membro con libro guida del movimento esperantista	€ 9,00
<b>SZ -</b>	Adesione alla Società Zamenhof – senza diritto di appartenenza a categoria alcuna	€ 108,00
<b>SA -</b>	Semplice abbonamento a rivista Esperanto	€ 34,00
<b>PT -</b>	Patrona membro de TEJO (con Kontakto)	€ 66,00
<b>K-TO</b>	Abbonamento alla rivista Kontakto	€ 20,00
<b>(T)</b>	Per i giovani sino a 29 anni è compresa la rivista Kontakto (obbligatoria la data di nascita)	

## **89-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

**Pekino - Ĉinio De la 24a ĝis la 31a de Julio 2004**

Ecco le quote d'iscrizione valide fino al 31 marzo e dopo tale data:

1- individua membro de UEA (ne inkluzivas MG)	190,00	230,00
2- ne individua membro de UEA	235,00	280,00
3- kunulo, junulo, handikapulo mem individua membro de UEA	85,00	115,00
4- kunulo, junulo, handikapulo ne individua membro de UEA	140,00	170,00

I versamenti si possono fare tramite la FEI, sul c.c.p. n° 37 31 22 04 a lei intestato, oppure presso la banca Ambro-Veneto, gruppo Intesa BCI, Ag. Milano 02, sul suo conto n° 36255-62 con le seguenti coordinate bancarie: ABI: 03069 CAB: 09446.

Per il Congresso, dati i lunghi tempi di notifica dei vostri versamenti, specie in c.c.p. (e per l'UEA fa fede la data di pagamento da parte della FEI), si prega di spedire per lettera o fax l'iscrizione, o comunicarla telefonicamente. Grazie per la vostra cortesia.

## **ABBONAMENTI PER L'ANNO 2004**

Pubblichiamo l'elenco di iscrizioni e di abbonamenti ai periodici fino ad oggi pervenuti. Altri verranno pubblicati sulla nostra rivista quando verranno forniti.

Onde evitare errori si prega di non inviare abbonamenti per riviste non elencate qui o sulla nostra rivista, senza prima interpellare la FEI.

<i>Iscrizione all'ILEI</i>	€ 18,00
<i>Espero Katolika</i>	€ 21,00
<i>Iscrizione all'UECI</i>	€ 16,00
<i>Katolika Sento</i>	€ 9,00
<i>La Ondo de Esperanto</i>	€ 25,00
<i>Literatura Foiro</i>	€ 30,00
<i>Juna amiko</i>	€ 12,00
De 2 ĝis 4 kopioj al la sama adreso	€ 9,00
Ekde la 5a kopio al la sama adreso	€ 7,00

<i>Komencanto</i>	€ 15,00
<i>Monato</i> (spedizione normale)	€ 44,00
<i>Monato</i> (spedizione via aerea)	€ 49,00
<i>Monato</i> (per posta elettronica)	€ 26,40
<i>Fornire l'indirizzo esatto di e-mail</i>	
<i>Jaro</i> (spedizione normale)	€ 5,00

Gli abbonamenti possono essere effettuati tramite la FEI, come già sopra indicato, oppure tramite il Circolo Esperantista.

## UN NUOVO SOCIO GARANTE

Il nostro socio *Ruben Conti* ha chiesto di essere iscritto tra i garanti, cioè tra quei soci che, in occasione dell'acquisizione della nuova sede di via De Predis, più bella e funzionale ma più onerosa come affitto, si sono offerti di coprire un eventuale deficit gestionale annuo da questo causato, fino ad un tetto massimo di 1800 euro, qualora non fosse stato possibile farlo con altri proventi. Un ringraziamento di cuore al nostro socio che, con pari sensibilità, si aggiunge agli undici che già aderirono, come attestò lo scorso bollettino del gennaio 2003.

## 72° CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO

**Treviso, dal 3 al 6 settembre 2004**

La timorosa ansia autunnale è per fortuna svanita: *Habemus Kongresum* anche quest'anno! Ed ad offrirsi di organizzarlo è uno dei migliori gruppi italiani, che può miscelare l'esperienza degli anziani con il dinamico entusiasmo di giovani molto validi. Con un impegno che promette bene. Ora sta a tutti noi rispondere alle loro aspettative con la collaborazione o almeno con la nostra partecipazione.

In attesa di poter pubblicare il programma dettagliato, ecco la tabella delle quote d'iscrizione:

	<i>fino al 15/5</i>	<i>oltre</i>
Socio FEI	40	50
Socio FEI familiare o giovane	20	25
Non socio FEI	52	70
Non socio familiare o giovane	26	35

Iscrizione gratuita per i ragazzi fino a 12 anni e gli accompagnatori necessari per handicappati. Sono giovani i nati dal 1° gennaio 1980, e familiari i conviventi con altro iscritto ordinario.

I pagamenti possono essere fatti alla FEI – Via Villorosi 38 – 20143 Milano (c.c.p. N° 37312204). L'iscrizione (il modulo è stato stampato sulla ultima pagina della rivista n° 7) può essere inviata allo stesso indirizzo o direttamente (sempre con fotocopia del pagamento effettuato) al Comitato Organizzatore presso: Flavia Dal Zilio – Via Cappella 17 – 31059 Treviso.

## **ESTRARKUNSIDOJ**

Ili estis du dum la lastaj du monatoj. La unua, la ordinara, okazis vendrede la 7an de novembro kaj ĉiuj konsilianoj ĉeestis. Post la legado de la antaŭa protokolo, la sekretario informis ke, pere de la Provinco, ni sciis pri nova konkurso por helpi kulturan agadon kaj ke ni tuj partoprenis en ĝi, esperante pri favora rezulto, ĉiam kun la teknika helpo de d-ro Taccani. Oni fine decidis pri nia ĉeesto en Interreto. Niaj s-anoj Foà kaj Pranzo prizorgos nian retlokon kie estos la ĉefaj rendezuoj kaj novaĵoj ĝisdatigitaj kune kun aliaj informoj. Ili konfirmis ke ĝi estas jam nun denove en ordo. La prezidanto aligos nian asocion al RCM (Rete Civica Milanese), pri kiu respondecos nia s-ano Andrea Montagner, por enmeti ankaŭ tie informojn kaj ĝisdatigitajn rendezuojn, sed kun alligo al nia retloko. Pri la reordigo de la biblioteko oni devas atendi la finon de la pretigo de la komputero, sed bedaŭrinde preskaŭ certe oni ne povos utiligi la laboron de s-ano Giorgi, jam farita de li per tre malnova komputera programo. Pri la venontjara manifestacio de Frankfurta E-Grupo por la centjariĝo, en kiu kelkaj milananoj volus partopreni, oni esperas havi precizajn detalojn ĝustatempe, por profiti de la grandaj aviadilaj rabatoj, haveblaj antaŭmendante la flugon antaŭ ses/sep monatoj. La prezidanto informis ke li havis fine rektan kontakton kun la koncerna konsiliano de nia Kvartala Konsilio. Li mem petos ĝian patronecon por niaj iniciatoj, kiel oni faris kiam nia sidejo estis en strato

Clusone, kaj ankaŭ nian enskribigon en la Kvartala Registro por havi la eblecon ĝui kelkajn avantaĝojn. Fine s-ano Foà raportis pri sufiĉe favora enketo en Verbania por kontroli ĉu ĝi estas taŭga loko por organizi nacian kongreson. Je la loĝiga vidpunkto la situacio estas bona: kongresejo kun aŭditorio kaj salonoj je akcepteblaj prezoj, hoteloj laŭ diversaj kategorioj. Nenia problemo estas por la turismaj programoj. Por la kulturaj aŭ la kongresaj aranĝoj estas nepre necesa la helpo de itala estraro por ilin pretigi alloge sed laŭbudĝete. Laŭ tiuj kondiĉoj milana klubo povus kandidatiĝi por la jaro 2005, sed rapide por mendi la kongresejon, ĉiam tre petita. Post sufiĉe longa analizo de pluraj aspektoj la estraro voĉdonis favore, kun unu nura sindeteno, por la kandidatiĝo. Oni ĝin prezentos okaze de la venonta kunsido de Nacia Konsilio en Ancona.

-----

La dua estrarkunsido, eksterordinara, estis kunvokita, laŭ la peto de s-ano Gianni Conti, la 15an de decembro por debati ĉu rezigni aŭ ne pri la organizo de la 73a Itala Kongreso en Verbania, post la nekuraĝiga rezulto akirita dum la prezento de ĝia kandidatiĝo en la lasta kunveno de Nacia Konsilio en Ancona. Fakte estis kelkaj kritikoj, precipe pri la pretendo havi tujan respondon, ne permesante taksii aliajn eblajn proponojn, oni havis la impreson pri sufiĉe malvarmema akcepto, la voĉdonado estis favora sed kun unu kontraŭa kaj tri sindetenoj. Inter tiuj ĉi unu signifoplena kaj influa por la nepra kondiĉo pri kulturaj aranĝoj, decidita dum la antaŭa milana estrarkunsido, kiu ne ricevis ian priatenton dum la debato en Ancona. Tio kaŭzis opini-ŝanĝon en la plejparto de la iamaj favoraj konsilianoj, kiuj konfirmis ke estus prefere ne riski komenci kun malfavoraj premisoj. S-ano Gianni Conti, subtenata de s-ino Serenella Giacchino, kontraŭe per elkoraj intervenoj invitis daŭrigi la iniciaton, certa pri niaj organizaj kapabloj kaj pri nia sukceso. Tamen en la fina voĉdonado ne ŝanĝis la nova situacio kaj la rezigno pri la organizo de la kongreso estis aprobita. Je la fino prezidanto Polerani donis la ĝojgan anoncon ke Milana Komunumo favore decidis pri nia peto pri subvencio por la jaro 2003, helpe al nia kluba agado.

*E.R.*

## **GRAVA INICIATO DE E.R.A.**

Sekve al la malsatostriko de s-ano Giorgio Pagano, denove okazis renkontiĝo inter radikalaj reprezentantoj kaj itala ministro Moratti kiu sin devontigis peti al siaj eŭropaj partneroj pri klerigo aranĝi konferencon por ekigi en jaro 2004 eksperimentadon de la internacia lingvo en E.U. La radikaluloj, kiuj jam programis kunvenon la 6an kaj 7an de decembro en Bruselo por debati la prioritatajn problemojn pri E.U., tuj enŝovis en ĝi ankaŭ la starigon de laŭcela Komitato por kunordigi kaj instigi la iniciaton en la diversaj eŭropaj ŝtatoj. Pluraj italoj ĉeestis en tiu aparta kunveno: inter ili inĝ. Bottoni el Milano.

## **KATEDRO**

La anoncitaj unuagradaj kursoj ĉe nia sidejo kaj Komunuma Lernejo de strato Casati, kaj tiuj ĉe Universitatoj de Tria Aĝo en Milano, Cormano kaj Paderno Dugnano daŭras regule, sed jen aliaj du kursoj kiuj komencis novembre:

- Triagrada kurso ĉe nia sidejo en strato Bramantino kun kvar lernantoj. Instruas s-ano *Glauco Corrado* marde je la 17.30a horo.
- Unuagrada kurso en Saronno ĉe Kultura Asocio "Esperanto" (ĝi antaŭnelonge naskiĝis kaj tiu estis la elektita nomo) kun deko da lernantoj. Instruas s-ano *Ermigi Rodari* ĵaŭde je la 18.00 a horo.

## **LA SCOMPARSA DEL PROF. ENRICO MINGO**

Lo scorso 29 novembre è improvvisamente deceduto Enrico Mingo, 88 anni, una figura storica del movimento esperantista italiano. Attivo insegnante membro dell'Istituto Italiano d'Esperanto, fondatore e per molti anni presidente del Gruppo Esperantista "Harmonio kaj Progreso" di Napoli, a lungo consigliere nella FEI, della quale fu anche vicepresidente ed ultimamente membro onorario, egli per quasi mezzo secolo con impegno e generosità dedicò il meglio delle sue poliedriche doti all'Esperanto. Il nostro Circolo esprime ai familiari e agli esperantisti napoletani il proprio sincero cordoglio.



## **ZAMENHOF-PREMIO EN ANCONA**

La ĉijara premio atingis sukceson eĉ pli grandan ol pasintjare kiam ĝi naskiĝis. Almenaŭ tricent personoj ĉeestis la ceremonion en la impona kaj historia konstruaĵo de “Mole Vanvitelliana” sabaton la 6an de decembro, vespere. Gravaj nomoj en la Honora Komitato de la Premio: iama ministro Tullio de Mauro, prokuroro de respubliko Armando Spataro, Mons. Riboldi, prof-ro Zichichi kaj aliaj. Enkondukis la programon nia prezidanto Grassini per koncisa prezento de Esperanto kaj ĝiaj idealoj kaj tuj oni komencis disdoni la premiojn, ankaŭ ĉijare tri verkoj de skulptisto Trubbiani, kies temo estas “Fuĝi el Babelturo”. Unu el ili estis donata al la edzino, ĉeestanta kun la fileto, de Carlo Urbani, la kuracisto kiu mortis pro SARS kuracante la malsanulojn pri tiu pulma sindromo. Alian ricevis aktoro Luca Zingaretti kiel reprezentanto de AMREF, la asocio kiu en Afriko ege sin engaĝigas por plibonigi la sanhelpan kaj socian situacion. La tria estis liverata al Italo Siena, reprezentanto de Naga-Har, la asocio kiu batalas kontraŭ la torturo kaj helpas la enmigrintojn. Ĉiam unu el la du geprezentistoj klarigis la motivojn de la aljuĝo kaj intervuijs mallonge la premiitojn ricevante interesajn kaj ofte kortuŝajn respondojn. Partoprenis en la ceremonio, kiel liverantoj de la premioj, deputito Luigi Giacco, provinca vic-prezidanto Giancarlo Sagramola kaj vic-prezidanto de IEJ Bethuel Chiesa.

Denove samtempe okazis la aljuĝo de Premio Umberto Stoppoloni, kreita de la familio por honori tiun eminentan esperantiston kaj juriston, kiun ĉiuj memoras. La monhela premio ĉijare estis liverita, fare de la filo mem Silvio, al “Associazione Italiana contro le Miopatie rare”, rekte al ĝia prezidantino.

Poste la programo antaŭvidis altnivelan koncerton kun pluraj pecoj de famaj operoj, fare de konataj operkantistoj. Ĉe fortepiano majstro Tullio Giacconi. La tuta manifstacio vekis grandan intereson ne nur en la urbo: pluraj gazetoj kiel Il Messaggero (plurfoje), Il Tirreno, Il Corriere Adriatico kaj alia deko da ili informis pri ĝi, krom aliaj informkomunikiloj.

## **SEMINARIO PRI INTERPRETADO EN ANCONA**

Oni ĝin organizis la 6an kaj la 7an de decembro, prave profitante la

samtempajn okazojn de Zamenhof-Premio kaj Estrar-Kunsido de FEI. La intencoj estis instigi la partoprenon de la junuloj (sed kial forgesi ĉiujn aliajn, antaŭvidante la universalan kongreson en Florenco?) evitante kromajn elspezojn pro plilongigo de la programo al la posta festotago de la 8a. Ĉar la rezulto estas unu el la taksiloj, la konkludoj ne povas esti tre favoraj. La unuan tagon estis dekkvar la aktivaj partoprenantoj kaj la postan ili duoniĝis pro la malĉeesto de la kunsidantaj estraranoj. Bedaŭrinde la junuloj estis vere malmultaj. Tamen la seminario estis tre utila por iomete alkutimiĝi al interpretado kaj konstati ke ĝi estas sufiĉe malfacila por preskaŭ ĉiuj. Tuja voĉa traduko estas vere pli komplika ol la skriba, kiu donas la necesan tempon por pensi kaj solvi la problemojn. Ju pli estas longa la tradukenda peco des pli lamas la memoro pri kio la parolinto diris. Tiu ĉi problemo ne ekzistas por la samtempa tradukado sed plenumi du taskojn kune ne estas por ĉiuj. Malsamaj ankaŭ la preferoj: kelkaj personoj pli flue tradukas de la itala al esperanto, la aliaj kontraŭe.

La ekzercado pri la du cititaj agsistemoj disvolviĝis per diversaj provoj: post parolado kaj post legado, grupe kaj duope, de esperanto al la itala kaj inverse, utiligante tekstojn kun tre malsamaj temoj, k.t.p. Kompetente estris la seminarion laŭvice la s-aninoj Michela Lipari kaj Anna Lowenstein al kiuj oni devas esprimi dankojn pro la iniciato kaj la esperon ke ĝi havu taŭgan sekvon ĉar interpretistoj, ankaŭ se neprofesiaj, necesas.

## **L'INCONTRO DI TRENTO CON BRESCIA E BOLZANO**

**Domenica 23 novembre 2003.**

Il gruppo di Trento, prosegue il suo progetto di instaurare maggiori contatti fra le altre associazioni. Con spirito di amicizia, tramite le visite delle vicine città, viene approfondita la loro conoscenza e nello stesso tempo vengono confrontati i progetti e le iniziative.

Per i nove amici di Brescia, l'incontro, organizzato a Trento fa seguito a quelli precedenti nella loro sede di Mompiano e a Milano; per i quattro amici di Bolzano è un consueto ritrovarsi.

Prima al castello del Buon Consiglio, ed in particolare, agli affreschi del pittore bresciano Romanino.. Poi agli affreschi dei

“Mesi” nella torre dell’Aquila, capolavoro del gotico internazionale, del periodo in cui l’arte sostituiva il latino come fattore di unità. Il clima continua amichevole anche al ristorante mentre gustiamo il menù locale. Accanto ai merli ghibellini delle antiche mura della città si respira già l’aria natalizia dei mercatini mentre nella sede del gruppo di Trento Lea Fabbri distribuisce copie del libro, appena uscito, “1981-2002 - Diario dell’attività della Cattedra di Esperanto di Bolzano”, da lei curato, con foto e notizie sugli avvenimenti esperantisti nella città. Nell’ambito della “Settimana della creatività” è stato proposto allo “Istituto Comprensivo Bolzano II - Don Bosco”, per la prima volta un corso di esperanto, con molto successo ed adesioni.

Sono presenti anche Segalla e Behmann, che con i loro articoli hanno rinverdito, attraverso i giornali locali, l’interesse per l’esperanto a cui Bolzano ha da poco intitolato una via. L’inaugurazione ufficiale sarà a primavera. Avvicinandosi la Zamenhof-Tago, prima di concludere, con un rinfresco ed affettuosi arrivederci, vengono dedicati flash agli anni giovanili di Zamenhof, e letti alcuni brani delle sue poesie.

*(da un articolo di Maria Lucchi)*

## **NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ**

Nia prezidanto Polerani revenis rekte el Romo por laŭprograme esti en sidejo prezenti la anoncitan videofilmeton pri Stoccolma kaj Goteborg okaze de la lasta Universala Kongreso. Li parte profitis de la videofilmo de s.-ano Amadei, tre bela sed tro longa por esti montrita dum ununura vespero. Je la teknika vidpunkto la tuta aranĝo ne tre bone sukcesis kaj ankaŭ la preterpasado de longaj pecoj, por selekti la plej interesajn, bezonas tro da enuiga tempo. Ankaŭ la malgrandeco de la video ne helpis, sed eble jam de la venonta fojo la problemo estos solvita danke al la sindonema donaco de granda video de nia kara s.-ano Mario Ceffali, kiel antaŭanoncis la sekretario. La unua parto de la programo estis dediĉita al la antaŭkongreso de Stockholmo, en kiu partoprenis ses milananoj, kun belegaj bildoj de la urbo kaj de ĝiaj lagoj kaj ĉirkaŭaĵoj. La dua al Gotenbarga Kongreso kun bildoj de la plej

gravaj okazaĵoj, kiel la inaŭguro, kelkaj kunvenoj, la nacia vespero, la aŭkcio, k.t.p. Sed oni vidis ankaŭ iom de la urbo, de la katedralo kun la esperanta meso, de la belegaj ekskursoj al mara insularo, lago kaj kasteloj. Post la fino de la filmeto s-ano Gianni Conti ilustris la eblecon partopreni en la starigo de la “Komitato por la Eksperimentado de Internacia Lingvo en E.U.” en Bruselo, la 7an de decembro, fare de ERA, laŭ la interkonsento kun ministro Moratti. Li eble partoprenos kaj invitis aliajn same agi.

Alia grava vespera programo okazis la 5an de decembro kiam inĝ. Guido Carravieri prelegis pri “La etaj esperantistoj kreskas”. Estis iamaniere reviviĝo tra la jardekoj pri la estroj, aŭ kelkfoje nur gravaj reprezentantoj, de la junularaj esperantaj organizoj. Li komencis per studentino Stamura Linardi, unua estrino de Itala Esperanta Junularo en la jaro 1912, kaj Sante Zullo pli-malpli en 1924. Kompreneble li ne povis paroli pri ĉiuj kaj sin limigis al kelkaj, precipe la plej konataj, kiel la fama Elio Migliorini, junulara delegito al la 16a Universala Kongreso kaj poste fama profesoro kaj prezidanto de la itala “Accademia della Crusca”. Post la lasta mondmilito estis Mario Guzzi kiu refondis la junularan italan movadon, kiu en 1955 sukcesis organizi la faman internacian kongreson en L'Aquila. En la jaro 1957 oni altigis la aĝlimon de junulareco de 16 al 25 jaroj. De la preleganto ankaŭ estis cititaj unu post la aliaj Giancarlo Fighera, fratoj Minnaja, Ranieri Clerici, Renato Corsetti, Mauro La Torre, Giuliano Turone, Michela Lipari, Edvige Tantin, Silvio Stoppoloni, Mauro Nervi, Valerio Ari, Carlo Sarandrea kaj aliaj ĝis fratoj Amerio, Marco Bezzi, Federico Gobbo kaj la nuntempaj kiujn ĉiuj konas. La preleganto mem esti prezidanto de IEJ. Tro da nomoj ne permesis dediĉi al ili sufiĉan tempon por scii iom pli pri ili. Tamen tio ĉi instigis inĝ. Carravieren mem proponi estontan renkontiĝon por kolekti kromajn informojn pri tiu ĉi temo, promesante ĝin aranĝi venontjare.

La vesperaj programoj de la jaro finis la 19an de decembro per la tradicia festo de “Kristnaska Paĉjo”, kiu, unuafoje en la nova sidejo, atingis la rekordon de sesdek partoprenantoj, inter kiuj preskaŭ unu kvarono estis infanoj aŭ knaboj. Priskribi la tre ĝojan feston estus neutile: ĉiuj scias pri ĝi, la varma etoso, ĝia disvolviĝo, la regalado.

## **KLAĈANGULO**

Jam de novembro en la fama retlisto “esperantisti italiani” ekaperas retmesaĝoj sen la subskribo de la sendanto, kies retadreso ikue\_romo evidente ne signifas ke la unua vorto estas la propra nomo kaj la dua la familia. Laŭ kelkaj tio estas pruvo de granda modesteco: valoras la ideoj, ne la personoj. Sed pluraj opinias kontraŭe: tiu homo sin taksas tiel fama kaj grava ke ĉiuj certe konas ne nur lin sed ankaŭ parkere liajn adresojn, k.t.p. Kiel la ardaĵ subtenantoj pri siaj idoloj.

.....  
Sed eble la klarigo estas alia: samkiel la Papo estas la oficiala Voĉo de la Katolika Eklezio, tiu Persono estas la oficiala Voĉo de la Katolika Esperantistaro. Fakte, ankaŭ en la adreso, Li estas IKUE.

-----  
Sur la kovrilo de la numero 7 de nia revuo estas videbla la nova simbolo de IEF, kiel oni legas en la klarigo de la posta paĝo. La lasta, numero 8, havas la saman klarigon sed sur la kovrilo panoramon pri Treviso. Eraro? Eble ne: la nacia kongreso estas unu el la simboloj de nia movado kaj ĉijare ĝi okazos en tiu urbo. Post ĝi, eble aŭtune, oni povus utiligi la simbolon de Premio Zamenhof, k.t.p. Ĉiam nova simbolo estas evoluiĝo kaj stimulo antaŭeniri.

.....  
Krome oni devas ankaŭ kompensi nian revuon kiu iras malantaŭen: kiel oni povas konstati, la n° 7 estas oktobra kaj la n° 8 septembra.

## **ANTICIPAZIONI DI “TURISMO PER ESPERANTO”**

L'organizzazione turistica del s-ano Aldo Foà (via Casale 7- Milano Tel.02 58 111 573, dal lun. al ven. ore 17-19, oppure 02 58 112 342) preannuncia una “Pasqua in Ungheria” dall'8 al 12 aprile da Budapest al lago Balaton e tra la Puszta, ed una “Foresta Nera tra Reno e Danubio” dal 30 aprile al 2 maggio.

Per agosto in programma viaggio in pullman “Finlandia e San Pietroburgo” attraverso Svezia ed Estonia, “Sudafrica” tra parchi e città, “Il profondo sud degli USA” con New Orleans e Florida, ed

infine “Viaggio in Vietnam e Cambogia” tra arte, templi e natura tropicale. *Altre informazioni* su <http://web.tiscali.it/itaka/>

## **NOTIZIE DAL MONDO**

**Abetone (Pistoia)** – Il bellissimo ostello della gioventù, tra boschi centenari, ospiterà dal 7 al 13 aprile il 28° Festival internazionale della Gioventù esperantista. Nel n° 8 della nostra rivista vi sono le informazioni dettagliate su programmi, quote, adesioni, ecc.

**Bruxelles** – In occasione di un convegno dei radicali italiani sul progetto del Trattato Costitutivo dell'UE in novembre, si è parlato anche di Esperanto. Un chiaro intervento a favore è stato fatto da Marco Cappato, ovviamente condiviso dai radicali esperantisti Clerici e Lapo Orlandi. Era presente anche Giorgio Silfer come osservatore, che è intervenuto in francese, non potendo usare l'esperanto e non volendo usare né l'italiano né l'inglese.

**Padova** – Il gruppo esperantista locale, per festeggiare il suoi novanta anni ha già realizzato un monumento a Zamenhof: un bassorilievo in bronzo su una stele di cemento. Verrà posta nell'esistente Giardino Esperanto e la cerimonia ufficiale, a causa dell'iter comunale, slitterà alla prossima primavera.

**Roma** – I programmi per l'estero di Radio Roma, compresi quelli in esperanto, ora vengono trasmessi anche in Internet. Ecco il sito: [www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml](http://www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml)

**Pekino** – I programmi in esperanto sono chiaramente captabili sulla lunghezza d'onda di m. 30, 36, 25, 40 pari a kHz 9880, 11810 dalle 19.30 alle 20.30, orario U.T.C. Indirizzi: Esperanto-redakcio, CRI 36, Ĉina Radio Internacia, Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio 100040 Retpaĝo: <http://esperanto.cri.com.cn> [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

**L'Avana** – Il 6° Congresso di Esperanto del continente americano (TAKE) si svolgerà qui, presso il Centro della Stampa, dal 21 al 27 marzo.

**Kaunas** – In distribuzione anche un secondo film in esperanto di 36 minuti dal titolo “Kaunas, la città sul fiume”, realizzato per far conoscere agli esperantisti in anticipo il paese che nel 2005 ospiterà il Congresso Universale a Vilnius.